

Litera Turo 2012



Regularo

Aprobata de la konsilantaro de Esperanto-Vannes 2011-05-27. Laste reviziita 2011-08-17.

Artikolo 1 - Difino

- 1) *Litera Turo* estas beletra konkurso en kaj por la internacia lingvo Esperanto kaj ties kultura disvolviĝo.
- 2) Ĝi estas organizata ĉiujare de la franca asocio *Esperanto-Vannes*.

Artikolo 2 – Lingvo de la konkurso

- 1) La lingvo de la konkurso *Litera Turo* estas la internacia lingvo Esperanto, laŭ ties difino en la *Fundamento de Esperanto*.
- 2) Supersignoj (ĉ ĝ ĥ ĵ ŝ ŭ) kaj surogatkodoj H (ch gh hh jh sh u) kaj X (cx gx hx jx sx ux) estas same validaj.
- 3) Kandidato rajtas ŝpare uzi alia(j)n lingvo(j)n kaj ties skribmaniero(j)n, neologismojn aŭ reformojn de Esperanto en sia(j) verko(j), se la kunteksto postulas tion. Sed oni klarigu (ekz. piednote) ĉion, kio ne estas klare skribita en kutima lingvaĵo.

Artikolo 3 - Branĉo

- 1) *Litera Turo* enhavas jenajn branĉojn:
 - Originala prozo;
 - Originala poezio;
 - Traduko el la franca lingvo.
- 2) Iu branĉo de la konkurso efektive okazos kondiĉe, ke partoprenas minimume tri personoj en tiu branĉo.

Artikolo 4 – Apartaj reguloj laŭ la branĉoj

- 1) Originala prozo:
 - Kandidato rajtas verki ekzemple novelon aŭ fabelon (sed nek teatraĵon, nek artikolon, nek eseon);
 - Maksimuma longo: 5 000 vortoj;
 - La sendota(j) verko(j) devas esti plena(j). Neniu fragmento (ekz. ĉapitro el romano) estos akceptita;
 - Kandidato rajtas konkursi per maksimume 3 originalaj prozverkoj.
- 2) Originala Poezio:
 - Kandidato rajtas verki poemon aŭ kanton (sed ne versteatraĵon), riman aŭ ne;
 - Maksimuma longo: ne fiksita;
 - La sendota(j) verko(j) devas esti plena(j). Neniu fragmento (ekz. ĉapitro el versromano aŭ strofo el pli longa poemo) estos akceptita;
 - Kandidato rajtas konkursi per maksimume 3 originalaj versverkoj.
- 3) Traduko el la franca lingvo:
 - Kandidato devas traduki jenan tekston: *Essais* (I, 31) de Michel de Montaigne (eltiraĵo); La tradukenda eltiraĵo elŝuteblas el la retejo (<http://www.esperantovannes.fr>) kaj la blogo (<http://verdando.over-blog.net>) de *Esperanto-Vannes*;
 - Se konsiloj aŭ rekomendoj akompanas la tradukendan tekston, kandidato devige traktos ilin kiel parton de tiu ĉi regularo;
 - Kandidato rajtas konkursi per maksimume 1 tradukverko.

Artikolo 5 – Partoprenantoj

- 1) Rajtas konkursi ĉiu unuopa esperantisto. Unu persono rajtas konkursi en pluraj branĉoj. Ĉiun verkon de unu persono en iu branĉo la juĝantaro aparte juĝas.
- 2) Ĉiu kandidato, per la nura sendado de verko(j), aŭtomate konsentas pri ĉi regularo.

Artikolo 6 – Sendado kaj ricevado de verkoj

- 1) Kandidatoj sendu sia(j)n verko(j)n inter la 2011-09-05 kaj la 2011-12-18 al la jena retadreso: literaturo@live.fr.
- 2) Kandidatoj menciu siajn nomon kaj poŝtadreson disde sia(j) verko(j).
- 3) Akceptindaj elektronikaj formatoj estas: .doc .docx .odt .pdf .rtf
- 4) La prezidanto de la juĝantaro zorgu pri la retadreso de la konkurso kaj korespondado kun la kandidatoj. Li/Ŝi interalie informas la kandidatojn pri la ricevado de la verkoj.

Artikolo 7 – Nevalidaj kaj nepermesitaj verkoj

- 1) Ne validas por la konkurso tradukoj (krom por la branĉo "traduko el la franca lingvo"), fragmentoj, kopioj, verkoj kolektivaj aŭ kiuj ne kongruas kun la jena regularo (ekz. en netaŭga formato).
- 2) Ne permesitaj por la konkurso estas verkoj ofendaj (rilate al persono, etno, homa digno ktp.), ŝovinismaj aŭ pornaj. Kiu iam sendos tian verkon, tiu neniam plu rajtos partopreni en *Litera Turo*.

Artikolo 8 – Kopirajto

- 1) Ĉiu partoprenanto, per la nura sendado de verko(j), aŭtomate konsentas pri neprofitocela eldonado de sia(j) verko(j) fare de *Esperanto-Vannes*, en formo aŭ papera aŭ elektronika.
- 2) La kopirajto restas ĉe la aŭtoro, kaj *Esperanto-Vannes* devige mencios tion kaze de eldonado.

Artikolo 9 – Juĝantaro

- 1) La juĝantaro de *Litera Turo* konsistas el prezidanto kaj minimume tri aliaj membroj. Ĉiu havas egalan voĉdonrajton.
- 2) La konsilantaro de *Esperanto-Vannes* nomumas la prezidanton de la juĝantaro, kiu poste mem elektas la aliajn membrojn kaj la tradukendan tekston por la branĉo "traduko el la franca lingvo" (800 ĝis 1200 vortoj).
- 3) Minimume du trionoj el la juĝantoj devas scipovi la francan (por prijuĝi la branĉon "traduko el la franca").

Artikolo 10 – Prijuĝado

- 1) Post ricevado de la verkoj, la prezidanto zorgu pri la valideco de la verkoj. Poste li/ŝi sendu ĉiujn validajn verkojn al ĉiu juĝanto zorgante pri la anonimeco de la verkoj.
- 2) Ĉiu juĝanto elektas la dek plej bonajn el la konkursaĵoj kaj numere vicordigas ilin laŭ ties relativaj meritoj. Se en la koncerna branĉo partoprenas malpli ol dek konkursaĵoj, juĝantoj vicordigas ĉiujn. La liston de la vicordaj numeroj ĉiu juĝanto sendas al la prezidanto. Krome, ĉiu juĝanto preparas noton pri la meritoj kaj malmeritoj de la konkursaĵoj, kaj ĝin sendas al la prezidanto.
- 3) La prezidanto sumigas la individuajn aljuĝojn, atribuant dek poentojn por unua loko, naŭ poentojn por dua loko, ok poentojn por tria loko ktp. En ĉiu branĉo oni deklaras la unua tiun konkursaĵon, kiu ricevis la plej multajn poentojn kaj la dua tiun, kiu ricevis la due plej multajn poentojn. Krome, la prezidanto preparas surbaze de la notoj senditaj de la juĝantoj ĝeneralan raporton pri la konkurso.
- 4) Se du verkoj ricevas saman kvanton da poentoj, oni subtrahas la poentojn aljuĝitajn de la prezidanto (ĉar li/ŝi konas la identecon de la kandidatoj) al tiuj ĉi du verkoj.
- 5) Se kandidato sendas plurajn verkojn por iu branĉo, li/ŝi ne povas gajni pli ol po unu premio en la koncerna branĉo ĉiujare sed povas gajni premion en alia(j) branĉo(j).

Artikolo 11 – Premioj

- 1) Oni atribuas du premiojn en ĉiu branĉo (laŭ la reguloj de la 10-a artikolo de ĉi regularo).
- 2) *Esperanto-Vannes* zorgas pri la premioj.
- 3) La premioj estos transdonitaj okaze de kunveno de *Esperanto-Vannes* (2012-01-22).